ESPERANTO
N-RO 238, APERAS DUSEMAJNE

# Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
HU-1675 Hungario
Tel: +36-1-2828885
eventoj@esperanto.org

*La plej ofta internacia gazeto pri la Esperanto-movado* — *2 / septembro 2002*

## MI SCIAS VIAN RETADRESON!

La kvarlitera UEA-kodo ekde nun estas pli ol datumbaza indiko. Danke al Joost Witteveen, la prizorganto de la oficejaj komputiloj, ĝi akiris plian funkcion - la retadresan.

Ĉiu individua membro de UEA, kies retadreson la CO posedas, ricevis personan adreson en la domajno uea.org, komenciĝantan per la kvarlitera UEA-kodo. Do, ekzemple ĉar la prezidanto de UEA Renato Corsetti havas kodon "retk-v", li ricevis personan adreson retk@uea.org.

La adreso estas nur plusenda, oni ne ricevas propran poŝtkeston en la servilo de UEA, ajna poŝto veninta al ĝi simple redirektiĝas al la baza retadreso de la UEA-membro, sciata de la CO-datumbazo.

Tre gravas noti, ke la poŝto venanta al la personaj uea-retadresoj, estas kontrolata pri Esperanteco! Ne E-aj leteroj ne estas plusendataj. La filtrado okazas surbaze de relative simpla kontrolo: se en la letero estas almenaŭ unu el kvin jenaj "magiaj" vortoj *"Esperanto, saluton, estas, dankon, bonvolu"* - ĝi estas plusendata. Alikaze al la sendinto venas afabla E-lingva aŭtomata respondo (i.a. meze de la teksto mencianta la "magiajn vortojn"), ke ne-Esperantaj leteroj ne estas plusendataj.

Tamen, se la filtrado ne plaĉas, oni rajtas ĝin forŝalti. Peti pri tio vi povas, sendante mesaĝon al la sekretario de la CO Atie van Zeist (rete: sekretario@co.uea.org). Al la sama adreso vi estas petataj anonci, se via baza retadreso ŝanĝiĝis.

UEA petas zorgeme uzi la servon - ne uzi ĝin por amasaj sendadoj al esperantistoj, ne plusendi per ĝi grandegajn dosierojn.

La celo de la servo estas plifaciligi kontaktojn inter UEA-membroj kaj amikan kunlaboron. Ĝi estis kreita kadre de laboroj pri plia enretigo de UEA-agado kaj ĝiaj servoj.

*CO de UEA*

## KONSULTEJO DE ADE

Se vi havas lingvan dubon, ne mem solvu ĝin. Antaŭ ol decidi pri la plej bona solvo por vi, demandu Akademion de Esperanto, AdE per mesaĝo al la direktoro de la Konsultejo ĉe Stefan Maul, rete: smaul86150@aol.com.

Akademianoj, kiuj kunlaboras kun la Konsultejo, rapide debatos la peton rete kaj vi rapide ricevos la respondon.

La servo estis uzata dum la pasintaj jaroj en ĉi tiu maniero ĉefe de esperantlingvaj ĵurnalistoj, kiuj troviĝis antaŭ la neceso nomi tre lastatempan aĵon aŭ aferon.

Estas grave proponata uzi la servon de AdE por solvi lingvajn problemojn.

La servo, tamen, funkcias ankaŭ laŭ la tradicia maniero, per letero al:

*Stefan Maul*
*Pferseer Str. 15, DE-86150*
*Augsburg, Germanio*
*Rete: smaul86150@aol.com*

## LINGVOTAGOJ: LA 26-AN DE SEPTEMBRO!

Laŭ propono de Konsilio de Eŭropo, ĉiujare la 26-an de septembro tuta Eŭropo festas kiel "tago pri lingvoj". Por sukcesigi tiun iniciaton por lingvolernado kaj lingva diverseco ankaŭ Esperantistoj povas kontribui. La samo validas por la "tago pri la patrina lingvo" de Unesko la 21-an de februaro.

*Anna M Ritamäki*
*Dragsfjärdsv. 690*
*FI-25700 Kimito, Finnio*
*Rete: anna.ritamaki@kolumbus.fi*

## PIV-KAMPANJO APERIS

"Aĉetu la novan PIV kaj donu vian malnovan PIV-on al la samideanoj, kiuj ne havas la rimedojn, kiel en la 3-a mondo"

La partoprenantoj de la UK jam povis mem kunporti la PIV al Fortaleza kaj tie doni ĝin laŭ propra elekto. Oni petas al la libro-servoj subteni tiun agadon.

UEA, ILEI, IEI kaj multaj landaj organizoj, certe regule havas la okazon transdoni la librojn al vizitantoj de- aŭ vojaĝantoj al- tiuj landoj.

*Eddy Raats*
*Rete: eddy.raats@pandora.be*

## KVINPETALO

La trian jaron sinsekve Kvinpetalo en Bouresse, Francio organizis staĝon pri la teatro sub la titolo "Leviĝas la Kurteno". Ĉi jare Georges Lagrange kaj Serge Sire alportis siajn talentojn por organizi kaj direkti kurson pri elokucio kaj aktorado

Parkerigi rolojn por aktorado estas, kune kun la necesaj prov-ripetoj, unu el la plej bonaj manieroj fariĝi flua parolanto de lingvo kiun vi deziras lerni, kaj tiel la konoj de Esperanto progresis en kiel eble plej agrabla maniero.

*L. Galindo*

## ARANĜOJ

### KAEST

Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko okazas inter 08-10. 11. 2002, Dobrichovice apud Prago, Ĉehio. Dum la konferenco okazas diversaj programeroj laŭ 3 sekcioj, kiuj rilatas al faka uzado de Esperanto. Jam scieblas kelkaj prelegoj dum la konferenco:

KAEST 2002

Sekcio A: Elektronikaj rimedoj:

Evolu-tendencoj de mikroproceziloj (Broczko, Hungario); Vikipedio - multlingva reta enciklopedio (Smith, Usono), Problemoj de diagnostiko de ruliĝantaj vagonoj (Kovar, Ĉehio), Projekto Vojaĝkarto (Olsen, Danio).

Sekcio B: Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto:

Pri kelkaj aktualaj sociaj terminoj (W. Blanke, Germanio), Lexicon Silvestre (Simon, Germanio), Matematika terminologio, ĉu matura finfine? (Bavant, Francio), Kelkaj problemoj de la ekonomika terminologio (Patera, Ĉehio), Fungoj mikroskope (Kavka, Ĉehio).

Sekcio C: Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko (ĝenerale):

Psika streso - kiel majstri ĝin (Nitzche, Germanio), Antaŭvido de migreno ĉe malsanuloj aplikante la teknikon "data mining" (Preradoviĉ, Bosnio kaj Hervegovino), Nomoj de planlingvoj - tipologio (D. Blanke, Germanio), Ĉesigi la disipadon de energio kaj postlasaĵoj (Werner, Ĉehio), Turismo kaj vivomedio (Chrdle, Ĉehio).

Verŝajne okazas ankoraŭ aliaj prelegoj. Oni atendas ne nur plene spertulojn sed ankaŭ tiujn, kiuj emas envolviĝi en la antaŭenigo de faka uzado de Esperanto.

Fakaj seminarioj antaŭ KAEST

Antaŭ KAEST ekde la 6-a de novembro, okazas paralele du seminarioj, la unua kun la temo trafiko, la dua pri la temo matematiko. Interesatoj estas bonvenaj eĉ se la koncernaj fakoj ne estas precize "iliaj".

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:

*Petro Chrdle*
*Anglicka 878*
*CZ-252 29 Dobrichovice, Ĉehio*
*Rete: chrdle@kava-pech.cz*

## ORGANIZAJ DEMANDOJ

### REBATO - EKZEMPLO PRI TIO, KION ONI POVAS FARI

Don Harlow estas usona esperantisto kun multaj ideoj kaj, ĉefe, kun la energio por realigi ilin. Antaŭ kelkaj monatoj li (re-)starigis la ret-liston "rebato@yahoogroups.com", kiu komencis funkcii kiel disvastiganto de artikoloj pri (ĝenerale "kontraŭ") Esperanto, por ke esperantistoj tra la mondo reagu al ili prefere en la lingvo de la ĵurnalo, foje en aliaj lingvoj, foje en Esperanto kun traduko al nacia lingvo.

En ĉi tiuj monatoj UEA atente sekvis la evoluon de tiu listo, ĉar ĝi perfekte kongruas kun la labor-plana linio: "Informado". Okazis, ke ĝi akiris 102 listanojn, kaj ke ĝi kaŭzis plurajn centojn da reagoj, el kiuj almenaŭ pluraj dekoj aperis en tre gravaj gazetoj tra la mondo.

Oni ne povas citi nomojn por eviti ofendi la necititajn, sed la elito de la esperantistaro, se mi rajtas tion diri, estas inter la reagantoj, kaj ili faras unuarangan laboron.

Jen tri finaj konsideroj:

- ofte la listo sukcesas okupiĝi nur pri artikoloj en grandaj lingvoj (angla, franca, hispana, portugala, foje germana). Estus la kazo aliĝi al ĝi por informi ankaŭ pri artikoloj en aliaj lingvoj;
- se vi havas iom da libera tempo, kaj se vi kapablas informi pri Esperanto, aliĝu al tiu listo per malplena mesaĝo al rebato-subscribe@yahoogroups.com, kaj kunlaboru;
- ankaŭ estus interese krei tiajn reago-listojn enlande (ekzemple en Pollando por polaj gazetoj). Mi scias, ke kelkaj landoj funkciigas tiajn reag-servojn, sed ne multaj.

*Renato Corsetti*

# Kompleta monata kalendaro

*La kompleta jara listo de E-aranĝoj daŭre aktualigata de ni, troveblas en interreto http://www.eventoj.hu . Korektoj, aldonoj estas bonvenaj! Por ricevi txt-formatan version sendu mesaĝon (enhavo ne gravas) al la aŭtomato: kalendaro@esperanto.org*

**04-06.10.** 89-a Japana Esperanto-Kongreso Floru Kulturo Porpaca en Surikamitei Ótori. Inf: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyjuku-ku Waseda-mati 13-3, Tókyó-to 162-0042, Japanio. Tel: +81-(0)3-32034581, fakso: +81-(0)3-32034582. Rete: jei@mre.biglobe.ne.jp

**04-06.10.** Faulhaber-Semajnfino pri komunikado en konferencejo Mennorode, Elspeet. Inf: Sally Krombee.van Aartsen, Vijverstr. 3, NL-4421 AW Kapelle, Nederlando.

**04-06.10.** 15-a Internacia Kultura Festivalo en Ústí nad Labem. Inf: Miroslav Smyĉka, Kojetická str. 90. CS-400 03 Ústí nad Labem, Ĉehio. Tel: +420-47-5532417

**05.10.** Ĉedanuba Esperanta Renkontiĝo en Komárno. Inf: Esperanto societo, Alica Komlošiová, Rovníková 6, SK-821 02 Bratislava, Slovakio. Tel.: +421-02-43291604, Rete: balaz12@post.sk

**06-13.10.** TEJO-seminario en Strasburgo "Homaj rajtoj sub ĉiutaga priesploro". Inf: seminarioj@tejo.org

**11-13.10.** KoKoLoRES kafoklaĉo kaj ludosemajnfino en Herne. Inf.: Petra Dückershoff, Auf der Panne 74 a, DE-44805 Bochum, Germanio. Rete: petra.dueckershoff@web.de

**11-13.10.** 46-a jarkunveno de GEFA, Germana Esperanta Fervojista Asocio, Baiersbronn (Nigra Arbaro). Inf: Siegfried Krüger, Dinkelsbühler Str. 12, DE-74074 Heilbronn, Germanio. Tel/fakso: +49-(0)7131-162688. Rete: slkrueger@gmx.de

**12-14.10.** 9-a Internacia Semajnfino Esperantista en Ludlow, Vermont. Inf: Esperanto-Societo Kebekio kaj Esperanto-Societoj de NovAnglio & NovJorkio, rete: esperanto@sympatico.ca

**19.10.** Turisma renkontiĝo, Komárno. Inf: Okcidentslovakia Esperanto Societo (OSES), Nataša Ŝándorová, Záhrebská 4, SK-811 05 Bratislava, Slovakio. Tel.: +421-02-52494587. Rete: nasta@nextra.sk

**19-26.10.** 10-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Cambrils (Tarragona). Inf: Santiago Torné Grau, Apartat 423, ES-08200 Sabadel, Hispanio. Tel. +34-937253421 kaj +34-937275021, fakso: +34-937314111. Rete: luis_serrano@e-milio.com

**24-15.10.** Montar-agrovilaĝa turisma evoluigo en Miercurea-Ciuc kaj Braŝov. Inf: Jolanda Józsi, str. Brinduselor 92 bl. 41A sc.C ap33, et.8, RO-2200 Braŝov, Rumanio.

**25-27.10.** 37-a Semajnfina Esperanto-Seminario en Neubrandenburg. Inf: Werner Pfennig, Uns Hüsung 29/1104, DE-17034-Neubrandenburg, Germanio. Tel: +49(0)395-4221398. Rete: werner.pfennig@web.de aŭ werner.lewien@t-online.de.

# FAKA APLIKADO

Kie sindikatanoj komencas sian tagon sur la reto

## LABOURSTART.ORG EN ESPERANTO

Por Esperanto-movado kaj por Esperantistoj estas utila kaj laŭ pluraj vidpunktoj grava laboro verki fakan aplikeblon por nia lingvo. Estas grava tasko ankaŭ tio, ki ne havu kiel eble plej grandan apervaloron en publika (ne Esperantista) medio. Tial estas sekvinda kaj utilega ekzemplo, kio okazis ĉe labourstart.org.

Labourstart.org estas internacia retpaĝaro por sindikatoj kaj sindikatanoj. Ĝi servas kiel reta servo de la internacia laborista movado. Ĝiaj servoj estas internaciaj kaj akireblaj en pluraj lingvoj. Inter la elekteblaj legvoj ekde ne longe troviĝas ankaŭ Esperanto.

La aperado de Esperanto versio estas ne nur utila fakaĵo por laboristoj esperantistaj sed ankaŭ bona varbilo. Se vi iras al www.labourstart.org, tuj en la supra parto de la ĉefpaĝo troviĝas la vorto Esperanto inter la elekteblaj lingvoj.

En Esperanto parto oni trovas freŝajn informojn, novaĵojn de la internacia laborista movado, kaj ankaŭ politikajn, ekonomiajn k. a. novaĵojn, pri kiuj certe interesiĝas sindikatanoj.

Ni esperu, kie kiel eble plej baldaŭ pluraj fakaj retpaĝaroj Esperantiĝas laŭ la ekzemplo de labourstart.org!

*Ret-Info*

# INTERRETO

## 50 000... KAJ KRESKAS

Sen granda bruo pasis la informo, ke jam 50 000 e-libroj estas elŝutitaj de eLibrejo. Ĉar tio okazis dum 13 monatoj, tio signifas, ke mezume estis liveritaj al esperantistoj 3846 libroj ĉiumonate. Inter la lastaj aldonoj al eLibrejo, nun ampleksanta 222 titolojn, menciindas "La aventuroj de Pinokjo" de Carlo Collodi, en nova traduko, la antologieto "Dek du amrakontoj", kiu jam atingis 400 elŝutojn, "La skandalo pro Jozefo", verko de Valdemar Vinar, originale verkita en Esperanto, kaj "Mi en li" de la ĉeha verkisto Ladislav Vladyka, kaj multaj aliaj.

eLibrejo ĉe:
http://www.esperanto.nu/eLibrejo

## DOKUMENTA KREDITO

Dokumenta kredito (ankaŭ: akreditivo, kreditletero, letter of credit) estas nemalhavebla ilo por sekurigi la pagon de liveritaj varoj, uzata en internacia komerco, kiam oni komercas kun ankoraŭ ne konata partnero. Eĉ spertaj komercistoj ofte ne konas tiun proceduron. Jen baza klarigo:

Per dokumenta kredito aĉetanto de varoj aŭ servoj disponigas monsumon ĉe sia banko aŭ ĉe la banko de sia liveranto. La liveranto nur povas disponi pri tiu monsumo post kiam li prezentis dokumentojn, preskribitajn en la kredito, kaj krome plenumis ĉiujn aliajn kondiĉojn menciitajn en la kredito.

*Roland Rotsaert, kasisto de IKEF*
*Visspaanstraat 97*
*BE-8000 Brugge, Belgio*
*Rete: roland.rotsaert@pandora.be*

## JURISTOJ EN LA RETO

Esperanta Jura Asocio havas siajn retapaĝojn ĉe: http://geocities.com/ejaaeu/. Oni trovas tie multajn interesajn materialojn kaj ligojn, inter alie la antaŭ ne longe tradukitan E-lingvan tekston de la Traktato inter Usono kaj Rusio pri malpliigo de nukleaj armiloj.

*laŭ Ret-Info*

# KONTAKTO SERĈATA

## REVIZANTOJ SERĈATAJ!

La eldonejo de Flandra Esperanto-Ligo (i.a. de Stafeto-libroj) ankoraŭ serĉas kelkajn fidindajn Esperanto-reviziantojn, kiuj pretas legi nove kompostitajn verkojn kaj elsarki komposterarojn. Por ĉiu revizanto ni antaŭvidas 2-3 manuskriptojn jare.

Kandidatoj bv. skribi al:

*Retbutiko de FEL*
*Frankrijklei 140*
*BE-2000 Antwerpen, Belgio*
*Rete: retbutiko@fel.esperanto.be*

## DENASKAJ SERĈATAJ!

Japana esperantisto Etsuo Miyoŝi serĉas tri aŭ kvar infanojn denaske parolantajn en Esperanto. La infanoj, prefere aĝaj inter tri kaj kvin jaroj, devus vojaĝi al (prefere) Londono. Ili estus fotataj kaj iliaj fotoj, nomoj kaj landoj de la patro kaj de la patrino aperus en reklama paĝo en granda japana ĵurnalo. La fotoj estos prilaboritaj de japana reklam-agentejo, kiu produktas la anoncon.

La kostoj estos je la ŝarĝo de s-ro Miyoŝi, sed ne estos alia kompenso.

Temas pri granda kampanjo kaj eble kelkaj familioj povus havi intereson veturi al Londono, kie s-ro Miyoŝi jam estas.

*Etsuo Miyoŝi*
*Rete: e.miyoŝi@swany.co.jp*

Aperis la nova, septembra Esperanto-retadresaro, kun 3136 adresoj de 2165 personoj el 95 landoj kaj kun adresoj de 772 retpaĝoj de 585 landaj/lokaj organizoj/gazetoj, kaj 80 internaciaj. La adresaro haveblas ĉe: http://home.wxs.nl/~lide/esperanto-adresaro_html.zip.

* * *

La Aŭstralia Nacia Botanika Ĝardenaro nun havas retpaĝon en Esperanto, por priskribi (kun bildoj) sian kolekton kaj inviti vizitantojn. Oni povas trovi ĝin ĉe: http://www.anbg.gov.au/anbg/esperanto/.

* * *

La reta taglibrejo "Live Journal" estas nun esperantigata. Jam ekzistas tie esperanto-komunumo. Ĝi akireblas ĉe: http://www.livejournal.com/userinfo.bml?user=esperanto.

# LISTIGO DE E-KURSOJ

Germain Pirlot rekompiladas oficialajn E-kursojn kiuj okazas je supera / universitata nivelo. Jam li faris tion inter 1977 kaj 1992 dum tiu periodo aperis 9 (ĉiam ĝisdatigitaj) eldonoj kun dekduo da paĝoj.

Mi esperas havi pli fidindan situacion ĝis la fino de la jaro. Fakte temas pri laboro, kiu postulas multe da tempo ĉar mi devas restarigi tutnovan informreton kaj rete kaj poŝte.

Kaze de kontaktoj kun eksterlandaj korespondantoj, vi povus eble mencii tion por diskonigo al kursgvidantoj de tiaj kursoj (ne forgesu mencii la retadreson de s-ro Pirlot!).

## Malneto

30.08.2002

Pri *oficialaj* E-kursoj kaj seminarioj pri interlingvistiko en universitatoj kaj superaj institutoj (universitata nivelo), laŭ jena ekzemplo:

## Klarigoj de mallongigoj:

La unua linio informas pri la urbo. Se post la urbonomo troviĝas "*", signifas, ke informis pri la kurso la kursgvidanto mem.

Linio "a" informas pri la universitato aŭ supera instituto kun adreso, nacilingve laŭ latina alfabeto

Linio "b" informas pri la kursgvidanto + privata adreso, poŝta kaj reta. En la linio estas menciita "P", se la kursgvidanto estas pagata.

Linio "c" donas mallongan priskribon pri horoj semajne "h / sem", kaj pri suma nombro de horoj "s".

La sekva linio (se ekzistas) enhavas informojn pri ekzameno, poentoj, atestilo k. s.

Nombro laŭlande: Aŭstrio (3); Bulgario (1); Ĉehio (2); Ĉinio (2); Germanio (3); Japanio (4); Korea Resp. (1); Litovio (1); Nederlando (1); Pollando (2); Rusio (1); Usono (2). Sume 23.

## Aŭstrio

Graz:

a) Universitato, Instituto pri Romanistiko.

b) Prof. d-ro Klaus Perko Klaus.Perko@lsr-stmk.gv.at.

c)

Innsbruck (*):

a) Universitato, Internacia Centro pri Lingvoj / Leopold-Franzens-Universität Innsbruck, Internationales Sprachenzentrum-ISC (Innrain 52, AT-6020 Innsbruck).

b) D-ro Klaus Karner, lektoro (Krebsbach 371, AT-6414 Mieming dr.klaus.karner@esperanto.at - dr.klaus.karner@utanet.at) (parte pagata).

c) Interfakultata (kurso por la studentoj de ĉiuj fakultatoj kaj studoj, parto de la studplano por la studo de Interlingvistiko. ("nejura libere elektebla fako" de la studplano por juristoj); enhavo: enkonduko en la planlingvojn, lingvokurso por komencantoj aŭ / kaj progresintoj (laŭ la konoj de la partoprenantoj); 2 h / sem.

Kun ekzameno (planlingvoj ĝenerale, historio de Esperanto, mallonga diskuto aŭ referato en Esperanto) kaj atestilo.

Wien:

a) Pedagogia Instituto / Pädagogisches Institut der Stadt Wien (Burggasse 14-16, AT-1070 Wien).

b) Prof. d-ro Hans-Michael Maitzen (Endemanngasse 6-18/1/24, AT-1238 Wien, maitzen@astro.univie.ac.at ) /P/.

c) Nedeviga; 2 h / ĉiun duan semajnon Temoj: eŭropa lingva situacio, instruado de lingvoj en Eŭropo, aktuala literaturo en Esperanto.

## Bulgario

Karlovo (*):

a) Internacia Universitato (p.k. 44, BG-4300 Karlovo).

b) Prof. Bojidar Leonov (p.k. 44, BG-4300 Karlovo, leonov@roz-abg.com).

c) Esperanto estas deviga studlingvo en la programo de la studado. s. 240 h. En la studadprogramo estas apartaj kursoj pri interlingvistiko, historio de E-movado, E-literaturo kaj kulturo.

Post la fino de la studado la studentoj ricevas bulgarajn diplomojn kaj tiuj, kiuj deziras, kaj plenumis la kondiĉojn de la studadprogramo de AIS, verkas kaj defendas sciencajn diplomverkojn por ricevi AIS-diplomojn. La studentoj partoprenas diversajn studadsesiojn de AIS en Bulgario kaj eksterlande.

## Ĉehio

Brno (*):

a) Pedagogia fakultato de Masaryk-Universitato, Katedro de didaktikaj teknologioj (KDT), (Porichi 31, CZ-603 00 Brno) [Garantion super la kurso havas Tutuniversitata centro de lingva instruado, garantio estas kursgvidanto (KDT)].

b) Inĝ. Josef Vojacek, PhD. (Sochorova 13, CZ-682 01 Vyskov, vojacek_j@jumbo.ped.muni.cz) (P).

c) Nedeviga, plua fremda lingvo, 2 semestroj, 3 horoj semajne (3 x 15 x 2 - entute 90 horoj) + dusemajna studrestado en Somera Esperanto Tendaro en Lancov ĉe Vranov-a digolago, konversacia kurso. Instruado per rekta metodo laŭ videokurso Mazi en Gondolando, "Paŝoj al plena posedo" de W. Auld kaj konversaciaj temoj.

Kun ekzameno kaj poentoj: la unuopaj kursoj finiĝas per studkontrolo, 3 kreditoj - ekzameno, 4 kreditoj kaj studkontrolo, 3 kreditoj.

Hradec Kralove (*):

a) Pedagogia Fakultato

b) Inĝ. Josef Vojacek, PhD. (Socgorova 13, CZ-682 01 Vyskov, vojacek_j@jumbo.ped.muni.cz) (P)

c)

## Ĉinio

Dalian (Liaoning):

a) Universitato / Dalian Daxue, Baishan (Lu 79, CN-116022 Dalian, Liaoning).

b) Doc. Wang Tailin (Chanzhou Jie 28-2-2, Shakehou Qu, CN-116023 Dalian, Liaoning) (P).

c) Nedeviga, dua fremdlingvo por studentoj de la fremdlingva fakultato en la 2-a kaj 3-a jaroj; 1 jaro, 2 h / sem, s. 72 h; 2 niveloj: 1-a, fonetiko, vortfarado, sintaktso, konversacio; 2-a, literaturo, tradukado, E-historio.

Kun ekzameno.

Dandong (Liaoning):

a) Liaoning Financa Kolegio / Liaoning Caizhuan Waiyubu (CN-118001 Dandong, Liaoning).

b) Prof. Sun Shiquan.

c) Nedeviga.

Kun ekzameno kaj 4 studpoentoj.

## Germanio

Berlin (*):

a) Universitato / Humboldt-Universität Berlin (Unter den Linden 6, DE-10099 Berlin).

b) D-ro Detlev Blanke (Gesellschaft für Interlinguistik e.V. www.interlinguistik-gil.de Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin dblanke.gil@snafu.de).

c) Interfakultata; 1 semestro, 2 h / sem (s. 30 h); prelegserio. Tipologio de planlingvoj, interlingvistiko, esperantologio, enkonduko al E-o (strukturo, evoluo, apliko, lingvokomunumo kaj ties historio).

Kun atestilo pri partopreno necesa por la diplomo resp. atestilo pri studlaboraĵo.

Leipzig (*):

a) Universitato / Universität Leipzig (Augustusplatz, DE-04109 Leipzig).

b) D-ino Sabine Fiedler (privata adreso: Am Zollamt 5, DE-04838 Gordemitz sfiedler@rz.uni-leipzig.de; universitata adreso: Insti-

tut für Anglistik, Universität Leipzig, Neubau Geisteswissenschaften, Beethovenstr. 15, DE-04109 Leipzig) (P).

c) Interfakultata; 1 semestro, 2 h / sem (s. 30 h); prelegserio. Tipologio de planlingvoj, interlingvistiko, esperantologio, enkonduko al E-o (strukturo, evoluo, apliko, lingvokomunumo kaj ties historio).

Kun atestilo pri partopreno necesa por la diplomo resp. atestilo pri studlaboraĵo.

Münster (*):

a) Universitato, Instituto por Ĝenerala Lingviko / Westfälische Wilhelms-Universität Münster (Schlossplatz 2, DE-48149 Münster).

b) D-ro Rudolf Fischer (Gustav-Adolf-Str. 2a, DE-48356 Nordwalde, fischru@uni-muenster.de).

c) Estas du kurstipoj:

1. Fakultata / Intensa E-kurso por komencantoj, ĉiujare komence de oktobro, 5 foje 5 horoj s. 25 h / semestre.

Kun atestilo pri partopreno.

2. Fakultata / Seminario kun ĉiusemestre alia titolo, ekz. enkonduko en la interlingvikon; 2 h / sem. = somere: 12 x 2 h, s. 24 h / semestre; vintre: 16 x 2 h = 32 h / semestre.

Kun ekzameno resp. studlaboraĵo, atestilo, poentoj por antaŭekzameno.

## Japanio

Kashiba (Nara) (*):

a) Universitato du-jara en Shoin / Virina Universitato (958 Sekiya, Kashiba Shi, Nara-ken 639-0298).

b) Anna M. Steffes (Tajiri 505-1, Kashiba Shi, Nara-ken 639-0253; Anna.Steffes@ma3.eikyou.ne.jp).

c) Du kursoj.

1. Nedeviga seminario, 1 jaro, 1,5 h / sem.; komencanta nivelo uzante la libron, "Saluton! Aŭtodidakte". Alie-kantoj, tradukado de infanaj libroj, ludiloj, legado de la vivo de D-ro Zamenhof. Ne estas ekzameno sed la lernantoj devas fari 10-paĝan tezon japanlingve pri Esperanto uzante la interreton kaj aliajn librojn.

2. Deviga trifoje eta seminario; 1,5 h / sem. Enhavo: legado de vivo de D-ro Zamenhof; studado de 20 paĝa libreto pri reguloj de Esperanto; vidbendo; kantoj; koloroj, numeroj; memprezentado en Esperanto.

Kobe (Hyogo-ken) (*):

a) Kobea Municipa Fremdlingva Universitato / Kobe-si Gaikokugo Daidaku (Gakuen-Higasimati 9-1, Nisiku, JP-651-2187 Kobe).

b) Tani Hiroyuki (Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561-0831 Toyonaka; tnhryk@pop07.odn.ne.jp) (P).

c) Nedeviga unujara lingvokurso, 1,5 h / s,. 45 horoj jare.

Kun ekzameno kaj poentoj.

Minoo (Osaka-hu):

a) Osaka Fremdlingva Universitato / Osaka Gaikokugo Daigaku (Aomatani-Higasi 8-1-1, JP-562-8558 Minoo).

b) Tani Hiroyuki (Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561-0831 Toyonaka; tnhryk@pop07.odn.ne.jp) (P).

c) Nedeviga, unujara lingvokurso, 1,5 h / s, s. 45 horoj jare.

Kun ekzameno kaj poentoj.

Tokio (*):

a) Tokia Universitato pri Fremdaj Studoj / Tokyo Gaikokugo Daigaku (3-11-1, Asahi-Cho, Fuchu-Shi, Tokyo, JP-183-8534).

b) Prof. Gotoo Hitosi (Nakayama 1-17-13, Sendai, JP-981-0952 gothit@sal.tohoku.ac.jp) (P).

c) Nedeviga, kroma fremdlingvo por studentoj de la fremdlingva fakultato en la 3-a kaj 4-a jaroj kaj studobjekto por studentoj en magstriĝaj kursoj; 1 jaro, sume 60 horoj. La kurso okazas intensive en somero kaj en vintro, po 30 horoj. Enkonduko en interlingvistiko, lingvistika superrigardo de Esperanto, gramatiko, konversacio, legado.

Pasintoj de la ekzameno ricevas 4 kreditojn.

## Korea Resp.

Seoul/Chonan (*):

a) Universitato Dankook / Hannam-dong Yongsan-ku Seoul, Korea (www.dankook.ac.kr) Anso-dong Chonan-si Choongnam, Korea.

b) Doc. Lee Jung-kee (Magistro pri planado) esperanto@unitel.co.kr (P).

c) 2 h / sem por 2 bazaj klasoj (en Seulo kaj Chonan respektive) dum unu semestro.

Kun ekzameno (2, semestre) kaj poentoj (2); sen atestilo.

## Litovio

Vilnius:

a) Universitato.

b) Doc. Laurynas Skupas (A. Stolginskio 4/7-13, LT-2001 Vilnius; irenaa@takas.lt)).

c) Libervola, dum 1 semestro.

Kun ekzameno kaj kreditunuoj.

## Nederlando

Amsterdam:

a) Universitato.

b) Wim Jansen (JansenWimH@cs.com).

c) Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperantologio.

## Pollando

Poznan (*):

a) Universitato / Adam Mickiewicz Poznan, Katedra Glottodydaktyki i Translatoryki, ul. 28 Czerwca 1956 r. nr. 198, PL-61-485 Poznan.

b) D-ino habil. Alicja Sakaguchi (Am Kreuzberg 5, DE-63776 Mömbris, Germanio, akaguchinet@gmx.de).

c) Por tagaj studentoj de ĉiuj kvin studjaroj, 2 h / sem (s. 30 h.); seminario / ekzerco. Bazaj nocioj de interlingvistiko, tipologio de planlingvoj, historio de universallingva ideo, kriterioj por konstruo de internacia helplingvo, evoluo de Esperanto, Esperanto-literaturo, socilingvistikaj aspektoj de funkciantaj planlingvoj, internaciismoj en planlingvoj kaj (eŭropaj) nacilingvoj; praktika kurso pri Esperanto.

Kun atestilo surbaze de ĉeesto kaj referaĵoj.

Poznan (*):

a) Universitato Adam Mickiewicz, Lingvistika Instituto (UAM, ul. Miedzychodzka 3-5, PL60-371 Poznan).

b) D-rino Ilona Koutny (Pobiedziska 14/22, PL-61-052 Poznan ikoutny@amu.edu.pl) (P); invititaj profesoroj: prof-oj John Wells, Humphrey Tonkin, Michel Duc Goninaz; d-roj Vera Barandovska-Frank, Detlev Blanke, Zbigniew Galor, Katalin Kovats, Blazio Vaha. (La tuta kurso estas pagata, tiel ankaŭ la instruistoj ricevas honorarion.)

c) Pro internacia karaktero estas invititaj profesoroj kaj diverslandaj partoprenantoj. 3-jara ekstera postdiploma stupo pri interlingvistiko; ĝenerala kaj aplikata lingvistiko; planlingvoj; gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto; komunikado, specialiĝo pri metodiko eblas.

Surloka kurso: 1-semajna sesio en septembro kaj februaro.

Kun hejma laboro kaj ĉiusemestre ekzamenoj. Kun diplomlaboraĵo kaj atestilo.

Krome : laŭokaze estas kursoj por la gestudentoj de la Lingvistika Instituto (kalkuleble al siaj studoj).

## Rusio

Moskva :

a) Eŭropa Jura Universitato, "Justo".

b) Gennadij Ŝilo (ejusto@dol.ru).

c)

## Usono

Brattleboro (Vermont):

a) Supera Instituto / School for International Training (SIT, Kipling Road, P.O.Box 676, Brattleboro, Vermont, US-05302-0672 info@sit.edu, http://www.sit.edu).

b) Diverslandaj kursgvidantoj; en 2002: D-rino Ilona Koutny (HU/PL), D-ro Alexander Melnikov (RU), S-ro Roberto Resende (BR).

c) NASK (Nord-Amerika Somera Esperanto-Kursaro eddyellen@aol.com - http://ttt.esperanto.org.nask). 3 semajnoj en julio; 4 niveloj : 1) por komencantoj; 2) por progresantoj; 3) Esperanto en interkultura praktikado; 4) lingvo, historio, kulturo, literaturo de Esperanto.

Kun ekzameno kaj 3 kreditunuoj.

San Diego (California) (*):

a) Universitato / University of California (Scripps Institution of Oceanography, San Diego La Jolla, California, US-92093-0202).

b) Prof. Ralph A. Lewin, PhD, ScD (8481 Paseo del Ocaso, La Jolla, California, US-92037 rlewin@ucsd.edu) (P).

c) Libervola. Okklasa kurseto (po ok 50 minutoj ĉiu klaso) La kurso nomiĝas "Internaciaj lingvaj problemoj; ĉu Esperanto estus helpa?", sed fakte la plejmulto temas pri la gramatiko, tradukado kaj uzo de Esperanto.

Kun 1 universitata kreditunuo.

*Germain Pirlot*
*Rete: gepir.apro@pandora.be*

### Redaktoraj piednotoj

Liston de E-kursoj havas ankaŭ Internacia Ligo E-Instruistoj, ILEI.

Ŝajnas, ke ankaŭ la ĉi supra listo ne estas plena, ĉar mankas eĉ la hungara Esperanto-fako de universitato ELTE kaj certe ankaŭ aliaj.

Bonvenas ĉiuj korektoj kaj precizigoj al la kompilanto, Germain Pirlot!

Se vi scias pri daŭra Esperanto-kurso je universitata nivelo bv. informi pri ĝi s-ron Pirlot kaj ILEI-n!

## MOVADO

### AGU KUNE DUM LA TAGO!

Jen denove venis la aŭtuno, denove proksimiĝas la tempo de la tradicia Ago-tago - ĉi jare la 5-an de oktobro.

Se vi jam decidis, kion vi faros dum ĝi bonvolu sciigi pri tio al Andrej Grigorjevskij, estrarano de UEA pri informado. Surbaze de tio estos kompilita komuna listo de planataj agadoj, kiun vi povos mencii dum intervjuoj al gazetaro, ĝi utilos ankaŭ por scii, ke vi agas tiutage ne solaj.

Se vi ankoraŭ ne decidis, kion okazigi, jen kelkaj sugestoj, akumulitaj el diversaj fontoj. Plej multaj homoj en verŝajne ajna lando ne scias, kio estas Esperanto. El tiuj, kiuj scias, pluraj pensas, ke tio estas fiaskinta projekto, ne plu uzata aŭ eĉ neniam uzita. Tial se danke al via aktiveco dum la Ago-tago tiu situacio iomete ŝanĝiĝos pozitivdirekte, tio estos tre bona atingo.

Vi povas i.a. okazigi surstratan manifestacion - al kiu necesas nepre inviti reprezentantojn de amaskomunikiloj, dum kiu oni disdonu informfoliojn pri Esperanto, rakontu pri ĝi al interesiĝantoj.

Preferindas, ke la manifestacio havu klarajn sloganojn.

Vi povas organizi ekspoziciojn de E-libroj en lokaj bibliotekoj. Por tio havu pli fortan efikon, nepre klopodu sciigi pri ili al la amaskomunikiloj.

Vi povas dispendigi informfoliojn pri E-o en publikaj lokoj, i.a. en bibliotekoj, lernejoj, universitatoj. Se ili pendos relative longe, ilia efiko povas esti eĉ pli granda ol de unuhora manifestacio.




Vi povas interkonsenti pri intervjuoj, anoncoj, informaj programoj en viaj lokaj televidoj, radiostacioj, ĵurnaloj. Lokaj amaskomunikiloj estas la plej legataj!

Kaj certe, vi povas fari eĉ pli grandiozajn agadojn. Pliaj sugestoj estas bonvenaj! Pliaj agadoj - des pli!

*Andrej Grigorjevskij*
*ul. Lenina 40-14, RU-429120*
*Sumerlja, Ĉuvaŝio, Rusio*
*Rete: andreo@fnmail.com*

## MALLONGE

Sidejo de la Amerika Komisiono de UEA estas ĉe Brazila Esperanto-Ligo. Dum la kunsido en la UK en Fortaleza estis anoncite, ke la gvidadon de la komisiono - kiel nova UEA-komisiito - transprenas Adonis Saliba. Atilio Orellana Rojas daŭre helpas la agadon kiel konsilanto.

* * *

En prestiĝa pola tag-gazeto "Przeczpospolita" la 31-an de julio 2002 aperis artikolo de Bernardeta Waszkiewicz sub la titolo: "Esperanto venkis - Letowski kaj Berdychowska demisiigitaj de Radio Polonia". Oni menciis en la artikolo, ke en la estonto preferataj lingvoj de la internacia kanalo de Radio Polonia estas angla, germana kaj Esperanto.

* * *

Komence de venonta jaro reaperos Pola Esperantisto - dumonata socikultura revuo de polaj e-istoj, kiu ĉesis aperi antaŭ jaroj. Demandojn kaj abonojn sendu al la redaktoro, Kazimierz Leja, prefere rete: kleja@demo.pl.

* * *

En Moskvo antaŭ ne longe aperis nova libreto de Nikolao Gudskov (iama redaktoro de Eventoj) "Epitomo de esperantologio", kiu enhavas en konciza formo informojn pri interlingvistiko, historio de E-movado kaj E-kulturo, ideologio de E-komunumo, metodikon de instruado.

* * *

Ni serĉas esperantistajn desegnantojn kaj komiksistojn, por projekto rilatanta humuron kaj komiksojn (bildstriojn) en Esperanto. Se vi estas (aŭ konas iun tian) interesata, bonvolu skribi al la jena retadreso: hodos@free.fr. Por la projekto ni serĉas e-istojn el multaj landoj.

* * *

La 4-an de septembro aperis la 400-a eldono de la retrevuo "Komentoj". Kvankam la ambicio de la ĉiutaga ĝisdatigo ĝis hodiaŭ restis revo, kiun D. M. Weidmann sukcesis plenumi nur parte, la 400 ĝisdatigoj ek de la apero de la unua eldono la 1-an de marto 1996 estas gratulinda.


* * *

Antaŭ ne longe aperis la libro "La Centra Oficejo de UEA en vortoj" de Gbeglo Koffi, estrarano pri Afrika Agado de UEA. La libro prezentas la Centran Oficejon kun ties ĉambroj. Estas ankaŭ vortoj pri ĉiutaga vivado en la oficejo, pri la oficistoj, volontuloj. Ne mankas informoj por atingi la sidejon de UEA. Kiu neniam vizitis la Centran Oficejon, sed legis la libron, tiu tuj havos ideon pri tio, kio okazas tie.

# INSTRUADO, ILEI

## ESPERANTA ENCIKLOPEDIO

Por movado ĝenerale kaj por instruistoj speciale gravas la nove kreskanta reta enciklopedio “Vikipedio” ĉe: http://eo.wikipedia.com, kien devus kontribui ĉefe instruistoj kaj utiligi ĝin ankaŭ por instruado kaj motivigo de lernantoj. Posedi en la reto Esperantlingvan informejon pri ĉiuj imageblaj temoj gravas por utiligo de la internacia lingvo, sekve ankaŭ kiel pruvo pri ĝia utileco. Ekde novembro 2002 aperis pli ol du mil artikoloj, kiujn eblas utiligi ankaŭ dum instruado.



En Vikipedion oni povas skribi ne nur pri ILEI kaj aliaj Esperantaj organizoj kaj eminentuloj, sed ankaŭ pri ĉiuj landoj, iliaj urboj, historioj, vidindaĵoj, artistoj, sciencistoj, bestoj, plantoj, pri ĉio, pri kio kutime informas enciklopedioj.

Vikipedio jam ekzistas en 26 lingvoj, la plej riĉa estas la angla (pr. 30 mil artikoloj), sed la nia povas ĝin baldaŭ atingi.

ILEI devus speciale prilabori pedagogiajn temojn (mi kontribuis per artikolo pri Komenio), tiel finfine kolekti ankaŭ la pedagogian terminaron (kvankam el enciklopedia, ne terminara vidpunkto), kaj ankaŭ pri aliaj temoj (geografiaj, botanikaj, kulturaj k.s.) estus plej taŭgaj kontribuantoj la instruistoj.

En la hejmpaĝo vi trovos konsilojn “Kiel krei paĝon” kaj “Kiel redakti paĝon”.

*Miroslav Malovec*
*Rete: starto@clavis.cz*

## NOVA ESPERANTO-UNIVERSITATO

Akademio Internacia de Sciencoj, AIS fondos en septembro kune kun la Lucian-Blaga-Universitato Sibiu, Romanio kaj la Filozofo-Konstantin-Universitato Nitra, Slovakio novan universitaton en Komarno, Slovakio kun la nomo Libera Eŭropa Universitato “Academia Kelemantia” (mallonge: UNI-KEL)

Ĝi havos komence 3 fakultatojn:

Internacia Fakultato por Interfakaj Studoj, Scienc-revizio kaj Universitata Pedagogio;

Eŭropa Fakultato por Minoritataj Kulturoj, Kulturprotektado kaj Koncertigita Eŭropa Evoluigado;

Transnacia Fakultato por la Mondvasta Dialogo inter la Kulturoj.

Ĉiuj, kiuj akiris ĉe AIS studentan legitimilon aŭ ĝin akiros komence de SUS 25, estu liberigataj de enskribiĝ- kaj kurskotizoj dum la unua semestro de UNI-KEL.

*Dieter Quednau*
*Am Hochanger 13*
*DE-85354 Freising, Germanio*
*Rete: quednau@wzw.tum.de*

# LIBROJ

## NOVA PIV

Nova Plena Ilustrita Vortaro jam estas akirebla de la libroservo de UEA.

La nova eldono, kiun ĉefredaktis Michel Duc-Goninaz, estas funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpigitaj en la teksto mem. Formato: 150x255 mm, 1265 paĝoj. Eldonis SAT.

La Librsoservo de UEA vendas ĝin kontraŭ EUR 78,00 plus la kutimaj aldonaĵoj: 10% sendokostoj; 6% imposto (nur por EU-landoj). Per mendoj de 3 ekz. samtempe (al la sama adreso) la LS donas sesonan rabaton (16,66%).

*Universala Esperanto-Asocio*
*Niuwe Binnenweg 176*
*NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*
*Rete: libroservo@co.uea.org*

# ANONCETOJ

Kun granda bedaŭro ni mencias, ke honora membro de UEA, Bruno Vogelmann (1909-2002) forpasis. Li estis Esperantisto ekde 1926, li estis kunaŭtoro de Internacia Ekonomika Fakvortaro kaj aŭtoro de La Nova Realismo (tradukita el Esperanto en 25 naciajn lingvojn). Li ricevis premiojn Deguchi (1992) kaj FAME (1993).

Esperanto-grupo de franca urbo okazigas aranĝon por aliaj grupoj de la urbo. Oni petas poŝtkartojn el ĉiu parto de la mondo ĉe: La Verda Stelo Esperanto 94, 3 / 507 rue Pablo Picasso, F-94600 Ĉoisy Le Roi Francio.

# KORESPONDADO

32 j. edziniĝinta esperantistino. Interesoj: lernigaj komputilludoj, libroj, revuoj por infanoj pri kantado, desegnado, skribado, kalkulado, legado, lernado de lingvoj, informado pri naturo, fotado, vojaĝado, komunikado, sanprotektado, feng shui, poŝtkartoj. Adreso: Raia Androvska, ul. Burel 72-b, ap.8, BG-1408 Sofia, Bulgario, rete: frakseno @yahoo.com.

65 j. virino. Interesoj: literaturo, poŝtmarkoj, kaj bestoj. Adreso: Claudine Rebeyrotte, 8, rue du Marechal Leclerc, FR-22580 Plouha, Francio.

28 j. instruisto de matematiko kaj tradukisto. Interesoj: filozofio, lingvoj kaj matematiko. Adreso: Frederico Jose Andries Lopes, Rua Alfredo T. Lopes, 210, Jardim do Sol, BR-36062-030 Juiz de Fora, Minas Gerais, Brazilio, rete: frelopes@zaz.com.br.

Pluraj, diversaĝaj togolandanoj deziras korespondi tutmonde per Esperanto. Por havi korespondamikon el Togolando, skribu al: Esperanto-klubo UVA, B.P. 12096, Lome, Togo.

16 j. komencanto. Interesoj: komputiloj, Esperanta movado. Adreso: Pau Climent Perez, Ap. 11, ES-03510 Callosa d’en Sarrie, (Marina Baixa), Pa_sos Catalans, Hispanio, rete: paucliment @wanadoo.es.

26 j. fraŭlo, nefumanto, komputilisto, eksinstruisto. Interesoj: astronomio kaj aliaj natur-sciencoj, lingvoj, moroj kaj folkloro, vivo de diversaj landoj, komputiko. Adreso: Jian Weijian, Tong fu zhong Lu, Shi ba mu heng 4 Hao, CN-510240 Guangzhou, Ĉinio, rete: jianweijian @21cn.com.

13 j. komencanto. Interesoj: komputiloj, programado, violono. Adreso: Jonathan Moylan, 91 Harriet st. Waratah NSW 2298 Aŭstralio, rete: jonathan@eepjm.newcastle.edu.au.

## "EVENTA LUDKVIZO"

Ĉiuj ĝustaj respondoj valoras 2 poentojn. Ludantoj, atingintaj 50 poentojn ricevas premion. Resendu la solvojn al la redakcio rete, letere, fakse.

**1. Kiu duobla prepozicio estas malĝusta?**

A. de apud

B. de ĉe

C. de antaŭ

**2. Kiu estas la verkisto de la originala Esperanto-romano: "Hura!"?**

A. Julio Baghy

B. L. L. Zamenhof

C. William Auld

**3. Kion signifas la mallongigo VEK?**

A. Vaganta Esperanto-Klubo

B. Vegetarana Esperanto-Klubo

C. Veterana Esperanto-Klubo

Limdato por alsendo: la 1-a de oktobro 2002. La ĝustaj solvoj aperos post 2 numeroj.

* * *

Respondoj al la demandoj aperintaj en numero 234-235.

**1. Kiu kaj kiam inicaitis fondi Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno?**

B. A. H. Marich en 1912

**2. Kiu verkis la unuan libron pri mondhistorio originale en Esperanto?**

A. Prof. Hermann Haefker

**3. Kion signifas la mallongigo IFEF?**

B. Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

*Ni invitas vin, ludu kun ni!*

*EVENTOJ,* Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X
A szerkesztőség címe: HU-1675 Budapest, pf. 87.
Tel./fax: 282-88-85. E-posta: redaktoro@eventoj.hu
http://www.eventoj.hu/
Megjelenik kéthetente. Nyomás: SZEL-KER Nyomda Kft.
HU-1149 Bp, Fogarasi u. 17/A
*EVENTOJ,* internacia gazeto pri la Esperanto-movado, en kunlaboraj rilatoj al Hungara E-Asocio.
Eldonas LINGVO-Studio. Redaktas: Axel Ország-Krysz
Oficeja kunlaboranto: István Mészáros.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro: László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavoj.
Abonkotizo: 34, aere 40 EUR al la UEA-kodo ELLS-S.

## INTERESE

## IDEOJ SERĈATAJ!

Okazos 200-a datreveno de la naskiĝo de la dana fabelisto H. C. Andersen en 2005 (2-an de aprilo). Dana oficiala komitato preparas jam plurajn aranĝojn. En la E-klubo en Naestved samideanoj opinias, ke ankaŭ en Esperantujo oni devas fari "ion" Tial oni fondis malgrandan komitaton. Sed kion fari? Pri tiu oni demandas vin. Ekz. pri tiuj temoj:



1. Ni certe scias, ke multaj el la Fabeloj kaj Legendoj estas tradukitaj al Esperanto (i.a. de Zamenhof en 4 volumoj), sed ni ankaŭ scias, ke ne ĉiuj estas pretaj en Esperanto. Kial ne klopodi traduki "la ceteraĵon"?
2. Ni faras registradon de la jam tradukitaj verkoj (kaj la ne-tradukitaj) de H.C. Andersen. La reto enhavas multajn informojn, kiujn ni jam trovis. Ni scias, ke kelkaj danaj samideanoj jam tradukis el la dana al Esperanto, sed ĉu oni tradukis el aliaj lingvoj al Esperanto? Ĉu vi scias pri tio?
3. Kiam la materialo estas en nia registraĵo do kion fari? Ni ankoraŭ ne decidis pri tiu temo, sed eble vi havas opinion - ĉu ne?
4. Ni petas vin, kontaktu nin pri la nomitaj temoj, ni kore antaŭdankas.

*Lars Kromann Jensen*
*Stenbrydervej 6, Varlose*
*DK-4640 Fakse*
*Rete: lars.ev@get2net.dk*

## NETRUDIĜEMAJ SERVOJ (2)

Sur turista vojo ĉe montfendejo deĵoras tre fortika ĉiĉerono kaj kontraŭ unu rublo helpas al turistoj transiri laŭ mallarĝa ponteto.

La plej malkuraĝajn li prenas subbraken kaj transportas. Jen aliras granda grupo kaj enviciĝas. La fortikulo translokas ĉiujn, du lastajn li prenas subbraken kaj iras. Meze de la ponteto lia nazo jukis. Li gratis ĝin kaj faligis unu turiston. La ĉiĉerono rigardas la turiston falantan malsupren kaj diras:

- Ha, diablo prenu! Restu kun via rublo!

* * *

Jonson vizitis por tagmanĝi malbonan restoracion ĉe la rando de la urbo. Li mirege ekkonis alirintan kelneron kiel sia unuversitata kunstudanto.

- Mike, ĉu estas vi?! Mi ne kredas miajn okulojn. Ĉu vi estas kelnero en tiu restoracio?
- Jes, kelnero, - fiere respondis Mike, - sed mi, almenaŭ, neniam tagmanĝas ĉi tie.

* * *

Mastrino dungante novan ĉambristinon, demandas:

- Diru, mia kara, ĉu vi amas papagojn?
- Ne maltrankviliĝu, sinjorino, mi manĝas ĉion.

* * *

- Sinjorino, ĉu vi anoncis pri dungado de servistino?
- Jes, ĉu vi konsentas servi ĉe ni?
- Mi konsentas, sed mi avertas, ke mi ne lavas plankojn kaj ne preparas manĝaĵojn.
- Ĉu vi, eble, ludas harpon?
- Ne, sed kial vi tion demandas?
- Mi bezonas, ke iu ludu harpon dum mi preparos manĝon kaj lavos plankon.

* * *

- Jam trian tagon mi ne volas labori. Kion tio povus signifi?
- Verŝajne hodiaŭ estas merkredo.

* * *

- Mi tiel amas, kiam la edzo estas apude... Apude, mi diris!

* * *

En familio de komercisto:

- Mi fordonis al vi la plej bonajn jarojn de mia vivo, - diras la edzino.
- Tamen kompense vi ricevis la plej bonajn paĝojn de mia ĉekaro, -trovis respondon la edzo.

* * *

- Mia kara, aminda... - komencis ŝi.
- Ĉu robon aŭ ĉapelon? - ageme informiĝis li.

* * *

- Mia kara, prezentu al vi: nia najbarino aĉetis la saman kostumon kiel mi!
- Nu, kion nun ni faru: aĉetu al vi alian kostumon aŭ translokiĝu en alian domon?

*el Anekdotoj en Esperanto*